

R. TOBELLA

Eidomisto de CLAU ESPERANTO kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 16 - Barcelona
ESPERANTA PRESEJO

TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas nur en esperanta lingvo; literaturo, enlanda kaj eksterlanda movado, rakontoj, amuzajoj por instruada praktiko k. t. p.

ĜARA ABONO / Ekster Hispanujo. 4 frankoj (1'60 sm.)
En Hispanujo . . . 3 . . . (1'20 »)
UNA NUMERO 40 centoj (0'40 sd.)
Por la abonantoj kaj kunlaborantoj 25 » (0'10 »)

Specimeno (nenomita numero) estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mondeĵoj devas esti akompanataj de mono.

Ĉiuj monsendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per franca, rusa aŭ hispana papermono; per internaciaj respondkuponoj da 10. sd. kaj per cekoj aŭ transpagiloj de la Ĉekbanko Esperantista.

Oni bonvolu skribi legeble sur respondpoŝtkarto, aŭ aldoni respondkuponon al la letero, se oni postulas respondon. Ĉiu nova abonanto ricevos scupage la eksterordinaran numeron de la V.^a Kongreso, samtempe ke li havos la rajton akiri la kolektojn de la jaroj 1908^a, 1909^a kaj 1910^a por la duono de ĝia valoro, t. e. po 1'50 fr. (sm. 0'60) ĉiu kaj, kiel la ceteraj abonantoj, povos mendii, por unu fojo dum la tuta jaro, trilinean anonceton.

ABONEJOJ

Francoj: Librejo de Esperanto, 15, rue Montmartre - Paris

Katalunujo:
S-roj Suñer kaj K., Presejo - S. Felu Gutxols.
S-ro Rosals - Portaferrisa, 30, Barcelono.
S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.
S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafrugell.


TARIFA POR ANONCOJ

Tuta paĝo. . . 12 frankoj (4'80 sm.)
Duono da paĝo 7 » (2'80 »)
Kvarono . . . 3'50 » (1'40 »)
Okono . . . 2 » (80 sd.)

Anoncetoj por peti korespondadon kostas 10 centoj. (1 sd.) ĉiu linio.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Tallers, 81 - Barcelono

Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro G. Anglada



LAMPARA C.

de filament metálic

Rouneix totes les ventatges de la millor estrangera

Dura 2000 hores i es la més resistant

i un 40% mes barata

Preu uníc, de 16 a 75 bugies, 2 PESSETES

Deposit i venda á BARCELONA:
Rambla de les Flors, 16, entlo.

Oni parolas kaj korespondas komerce per Esperanto

★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legajojn de ĉiulandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas per ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj ĉu per privata legado.

Prezo po kajero 0,10 Sm (0,20 M.)
Seriede 12 volumoj (afrancite) 1,25 Sm (2,50 M.)
Ĉiu libreto enhavas 40 - 50 paĝojn.

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W., Linden - Strasse 18 - 19.
Por Hispanujoj Joan Rosals, Barcelono, strato Portaferrisa, 30



Bazar Esperantista

Specialaco en la mezuro de ŝmizoj por viroj. Konfekcioj por sinjorinoj kaj geinfanoj, krovatoj, poŝtukoj, gantoj, parfumoj, trikotoj kaj aliaj artikoloj.

Trafalgar, 2 - Jaqueras, 18
BARCELONO

TUTMONDA ESPERO



Barcelono, Marto 1911^a

40 cent.

MISTERA KRIMO

Amaza unuohia komedieto. 1 fr. (0'400 sm.)

Mendeblaj ĉe MIKHELO CASES, Strato Salmerón, 229, 4.º - Barcelono (Espania)

Unu fojon...!

Humorajaro tauga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

MI DANKEGOS LA ANONCAN INTERSANGON

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA, organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Jarabono: fr. 5 (sm. 2). Centra Oficejo, 31, rue de Clichy, Paris.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la esperantistoj. Ĉefredaktoro, Th. Cart, 48 paĝoj da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo. Jarabono: 5 fr. (2 sm.)

JUNA ESPERANTISTO, monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj. Jarabono: 2'50 fr. (1 sm.); Ambaŭ kune: 6'25 fr. (sm. 2'50).

LA REVUO, internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. Zamenof; ĉe Hachette kaj K.º, 79, Bd. St. Germain, Paris. Jare (francujo), fr. 6; eksterfrancujo, fr. 7 (sm. 2'75).

FRANCA ESPERANTISTO, monata organo en franca kaj esperanta lingvoj. Administracio, 46, Boul. Magenta, Paris. Jare, fr. 4 (sm. 1'60); francujo, fr. 3.

GERMANA ESPERANTISTO, monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto. Jara abonprezo, 3 m. (1'50 sm.) en ĉiuj landoj; prova abono por 6 monatoj, 1'50 m. (sm. 0'75). Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 58, Lindenstr. 18-19.

LA ONDO DE ESPERANTO, ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj. Jara aboupago, 2 rubl. (sm. 2'12). Tverskaja, 26, Moskvo, Rusujo.

THE BRITISH ESPERANTIST, oficiala monata organo de B. E. A. Jarabono: s. 3 (f. 4). 1'60 sm. Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 133-136, High Holborn, London W. C.

VERDA STELO, monata oficiala, organo de C. M. E. Redakcio, 1.º Aduana Vieja, n.º 4; adreso: apartado 2759, Mexico, D. F. Jare: doll 1 (sm. 2).

INTERNACIA SCIENCA REVUO, Monata-Verlag Eldonejo, Közchenbroda-Dresden. Jare: fr. 7 (sm. 2'75).

BELGA ESPERANTISTO, monata organo de B. L. Ĉe S-ro Oskar Van Schoor, 20, Vondelstraat, Antverpeno. Jare: (en Belgujo, fr. 4) fr. 4'50 (sm. 1'60).

GAZETO HISPANA, oficiala organo de Hispana Societo p. p. Esperanton kaj de la aliĝintaj Grupoj. Abonprezo: 1'20 sm. (3 pesetoj) jare. Sidejo de la Administracio: N. Torrero, 10, San Fernando (Cádiz).

LA SPRITULO, monata internacia gazeto por serco, humoro kaj satiro. Ĉe Richard Bresch, Tolkewitzerstrato 20, Germanujo. Jare: mk. 2'50 (sm. 1'20).

DANUBO, internacia gazeto redaktata nur en Esperanto, eliranta post la 15 de ĉiu monato. Strato I. C. Bratianu, 5, Bucaresti (Rumanujo). Jare: 3'50 fr. (1'40 sm.)

NOVA SENTO, organo de la Vaska Esperantistaro. Aperas ĉiumonate. Strato Jardines, 7, Bilbao (Hispanujo). Jare: En Fremdlando, 2'25 pesetoj (0'90 sm.); en Hispanujo, 1'75 pesetoj (0'70 sm.).

TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4ª Jaro

Barcelono, Marto 1911ª

N-ro 37

ENHAVO: Sub la Sankta signo de l' Espero kolektiĝas pacaj batalantoj... — La Statuo el Neĝo. — Pensajoj. — Kantu, kantu, karulino. — La homo. — Tramveturillirante. — Sur la laguno. — Humoraĵo. — Diversaj sciigoj. — Bibliografio. — Gazetaro Esperantista. — Redakcia korespondado.

SUB LA SANKTA SIGNO DE L'ESPERO KOLEKTIĜAS PACAJ BATALANTOJ...

Tion neniu devus forgesi, sed bedaŭrinde, ne okazas tiele. Kelkaj — supozeble ne intence — el tiuj kiuj pro sia rango, talento kaj aliaj enviindaj ecoj estas devigataj konduki la Esperantistaron al frata celo, ne dece plenumas ilian mision kaj obstinaj, blindaj, ne trafas la rektan vojon; ili — akcepteblе nevole — semas malamon anstataŭ amon; anstataŭ unuigi la fortojn, ili diskunigas ilin; memtrompuloj, senkonscie trompas la aliajn! Ĝis kiam tio daŭros? Pripensu iom, karegaj, kaj ni ĉiuj oferu la homajn pasiojn, la propran amon — despli bone la Satanan fierecon — al Sankta Idealo. Tiam ni vidos, tagon post tago, pligrandigi niajn vicojn anstataŭ rimarki, malĝoje, kiel nun, la izolecon — preskaŭ ekzigon — de tre estimataj kamaradoj; ni evitos la miron, ĉu kompatan ĉu mokan, de la neadeptoj, antaŭ niaj tiel riĉindaj kiel senfruktaj malinterkonsentoj.

Faru ni tiun grandan rondan familion, rekomendita de la Majstro amata; ni klopodu, ni penu por ke ĝi estu inda je ni kaj je la graveco de nia lando. Por atingi tion, tute simpla estas la rimedo; sufiĉas nur larĝigi tiun rondon, ekzistantan jam de longe, tiun malnovan kaj, malgraŭ ĉio, nune la plej konata kaj multenombra. Kiam ĝi estu pli granda, tre granda, vastega, oni agu laŭplaĉel Ĉu oni devas ŝanĝi nomon, sidejon, k. c.? Estu ĉio ŝanĝita, se oni tion kredas konvena por la bono de Esperanto; sed unueco, paco kaj forto regu ĉiam la Esperantistaron!

Ĉesigu ni niajn — kelkfoje eĉ malnoblajn — intrigojn; lojale ni interbatalu, nekaŝeme, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, kaj se ni volus riproĉi aŭ kritiki unu la alian, klopodu ni tion fari fundamente kaj klare, t. e. laŭ nia proverbo, kiu konsilas nomi al pano panon, vinon al vino kaj ne male.

Tiuj, kiuj volu aŭdj, aŭdu; vidu, tiuj kiuj volu vidi.

LA STATUO EL NEĜO

De ĉe unu el la plej altaj fenestroj de sia kastelo, la scienculo Heriberto rigardadis la ampleksajn kampojn, la altegajn montojn kaj la malproksiman vilaĝon kovritajn de neĝo. Ĉio estis blanka; la ĉielo kaj la tero. Tiu homo kiu estis kuŝiĝinta malfrue, dediĉinte longajn horojn de la nokto al siaj studoj, ĵus leviĝis. Estis proksimume, la deka matene. La ĉambro en kiu li estis, estis lia laboratorio, kaj eniri en ĝin, estis tute malpermesita al la profanoj.

Heriberto havis malgajan historion. Li havis tiam tridek kvin jarojn, kaj vivis sen iluzioj, sen esperoj; lia koro batis pro nenia impulso de ama sento, de dolĉa amikeco, aŭ konsola simpatio. Li estis aminta, dum alia tempo, kun varmega pasio, virinon. Ŝi, ŝajnis en la unuaj momentoj korespondi al lia ŝamo; poste, ŝi estis lin forlasinta por tiu, kiun li juĝis sia plej bona amiko, por Rolando. Tiu vundo ne estis ankoraŭ cikatriĝinta, nek estis facile ke ĝi iam fermiĝos; la sciencisto vivadis kun siaj servistoj, akceptante neniun, vidante neniam virinon. Okupita en sia scienco kaj en siaj memoraĵoj, li vidis sian ekziston malrapide forpasi.

Apud la kastelo, kelkaj knaboj malgraŭ la malvarmo kaj la neĝo, sin amuzis farante el ĝi, grandajn bulojn. Unu el ili, la plej aĝa el ĉiuj, kiu estis eble dek sep jara, kaj estonte fama skulptisto, estis disiĝinta iom de siaj kamaradoj, kaj faradis el neĝo malmoliĝinta la foliojn de bela floro kiun eble, povus klasifiki neniun botanikisto, sed kiu malgraŭ tio, estis vera mirindaĵo.

Heriberto estis okaze atentinta la laboraĵon de tiu knabo, kaj ŝajnis ekstaza en la rigardado de tiu stranga verko.

Ĵus elfinita la floro, la artisto komencis fari statuon, el la floro deveninta. Ĝi estis la figuro de belega virino, lia ĉi-idealo sendube, vestita per larĝa mantelo, kun la hararo kaprice kombita. Kiam la knabo finis sian verkaĵon, vidis ke la sinjoro de l' kastelo estis apud li.

— Ĉu vi volas vendi al mi tiun ĉi statuon? li demandis.

— Tiu ĉi statuo malaperos post nelonge—respondis la knabo. Ŝajnas ke la suno baldaŭ traŝiros la nubojn, kaj la unua el ĝiaj radioj kiu kisas tiun ĉi frunton, neniigos tiun ĉi vizaĝon, kiu ŝajnas kovrita el larmoj: foriros ĉiuj linioj, kaj ĉio fariĝos malmulto da koto. Tiu ĉi virino estas el glacio...

— Kiel ĉiuj.

— Sen animo.

— Kiel multaj.

— Sen sentoj nek pasioj.

— Ne estas la sola kiu estas tia..

Li estas freneza—pensis l' artisto, kiu estis revema kaj entuziasma.

— Ĉu vi vendas al mi la statuon? redemandis Heriberto.

— Mi ĝin donas al vi.

— Prenu kaj foriru, diris la mastro de l' kastelo donante al li poŝen plenan el moneroj.

La skulptisto kiu estis tre malriĉa, foriris, kun la koro verŝanta ĝojon. La aliaj knaboj, estis antaŭ longe foririntaj.

Ĉar la verkado estis tre longedaŭra, estis jam la tria posttagmeze, kiam Heriberto troviĝis sola antaŭ la statuo, la Floro el Neĝo, kiel li nomis tiun verkon.

Li proksimigis fajfilon al siaj lipoj, kaj post nelonge alvenis kelkaj misteraj estaĵoj, tra l' aero unuj, tra la interno de l' montoj aliaj, kaj ceteraj de proksima fontano.

— Sorĉistinoj, feinoj aŭ gnomoj—diris Heriberto—prenu, ne difektante ĝin, tiun ĉi statuon, kaj konduku ĝin al mia laboratorio. Estas necese ke tiu ĉi virino el neĝo, havu vivon, ke ŝi sentu, ke ŝi parolu, ke ŝi min konsolu en mia malfeliĉo.

La mastro de l' kastelo, mastro ankaŭ de tiuj supernaturaj estaĵoj, kiuj obeis liajn ordonojn, eniris en sian loĝejon, sekvita de l' servistoj kiuj surportis la statuon.

Kiam oni lokis ĝin en la laboratorio, ili ne povis ebligi ke la statuo rediĝu de la floro, kiu, kiel oni scias, estis farita samtempe ol la virino.

La knabino el neĝo, estis lokita meze de la ĉambro; ĉirkaŭ ĝi, komencis danci la feinoj, salti la gnomoj, kaj kanti la sorĉistinoj. Dume, Heriberto, prenante kelkajn boteletojn el sia laboratorio, verŝis al ĝi kelkajn gutojn el fluidaĵo sur la frunton, el alia, sur la okulojn, el diversaj, sur la lipojn, bruston kaj manojn, kaj la statuo, iom post iom perdis sian blankecon, kaj akiris la kolorojn de la karno, kaj la haroj, blondoran koloron, kaj la okuloj, ĉielbluan, kaj la lipoj, ruĝegan. Unu kiso de feino en la frunto, aperigis la penson, gnomo per tuŝo de fingro sur la lipojn, donis al ĝi la parolon, kaj sorĉistino per palpo de sia senkarna mano, sur la koron, naskis la sentojn.

— Lasu ŝin ripozi, diris la scienculo; morgaŭ ni finos la verkon.

La feinoj kuŝigis Floron el Neĝo sur kanapon, kie ŝi ekdormis.

— Ne forgesu Heriberto—diris sorĉistino de granda scio, kaj ne malmulta spertado, al la mastro de l' kastelo—kiel malforta estas la naturo de tiu ĉi virino farita el neĝo. Zorgu ŝin bone; neniam ŝi ricevu la radiojn de l' suno, kaj alproksimiĝu al fajro. Ŝi estos bela, ŝi estos bona, ŝi estos inteligenta, sed estas necese, ke ŝi estu malvarma. Ĉu iu el vi—diris rigardante siajn aŭskultantojn—faris ion, por ke ŝi povu enamiĝi? Ĉu vi donis al ŝi la substancon kiu inspiras la pasiojn, kiu naskas la esperon aŭ kiu subtenas la iluzion?

— Ne, ne, respondis kelkaj voĉoj,—neniom el tio, ni donis al ŝi.

Nur unu gnomo restis silenta, kaj neniun tion rimarkis. Kiam la sorĉistino estis lokinta la manon, sur la koron de Floro el Neĝo, li, la gnomo, sciivoleme estis alproksimiĝinta blovante tra la spaco de du fingroj, kaj tiu blovo flamiga, estis sendube naskonta la ĝermon de amo.

Timante punon, la gnomo ne rakontis tion de li faritan, pensante ke ĝi ne havos gravecon.

— Dankon, miaj amikoj,—diris Heriberto adiaŭante siajn vasalojn,—neniam mi forgesos kion vi faris por mi.

Elirante, ili vidis ke la floro farita de l' artisto, estis fluidiĝinta, inundante de akvo la plankon de l' laboratorio.

**

La tagoj pasis malrapide, kaj poste la monatoj, kaj eĉ kelkaj jaroj.

La statuo fariĝinta virino, eksentis la vivon, estante Heriberto ŝia gvidanto, ŝia plej bona amiko.

Li jam ne plu konsideris sin, malfeliĉa: li havis apud si estulon, kiu, ĉar estis de li formita, lin komprenis, kaj donadis al li kuraĝon por labori. Lia vivo ne estis jam sencela: tiu virino bezonis lian vivon por ke li estu ŝia apogilo: ŝi kunvivadis ĝoja en sia soleco, kaj ne deziris vidi alian mondon ol la murojn de l' kastelo. Floro el Neĝo eliris neniam, nek rigardis la altegajn montojn nek la malproksiman vilaĝon. La ĉambroj por ŝi difinitaj, havis grandajn fenestrojn tra kiuj oni nur povis vidi la ĉielon, kaj tra kiuj, neniam penetris varmeta radio de suno. Estis tie, luksaj mebloj, harpo, belaj pentraĵoj por plezuro de l' okuloj, kaj biblioteko kun simplaj libroj por distri la imagon. Heriberto restis kun ŝi multfoje, ne atentante pri la varma sento kiun tiu virino estis en li vekinta.

Li sciis ke li ŝin amis kun sia tuta animo, sed li suspektis ke tio estis tiel, ĉar ŝi estis faritaĵo lia: li ne konis la turmenton de l' amo, la ĵaluzecon, ĉar Floro el Neĝo nur vidis la maljunajn servistojn de l' kastelo, nek la doloron de l' disiĝo, nek la timon de l' forgeso. Li estis la unika, kiun la junulino povis ami; li havis nek malamikojn nek konkurantojn.

Alvenis, kvarfoje, la printempo, daŭrante la vivo de Floro el Neĝo en la sama stato.

Dum tiu tempo, mortis unu el la servistoj de l' kastelo, kaj tial ke ili estis malmultaj, nepre Heriberto devis lin anstataŭi. Prezentiĝis viro maljuna kaj malbela, bone rekomendita de alia servisto, kaj la mastro akceptis lin tuj.

Unu tagon, la scienculo vidis sin en la devo eliri, dum mallonga tempo, el la sinjora domo. Floro el Neĝo ludis la harpon por distriĝi, kiam ŝi aŭdis en la apuda ĉambro, junulan voĉon kiu ekkantis, laŭ la takto de tiu muziko, kanton de amo.

Ŝi ĉesis ludi, kaj aŭskultis kun profunda atento.

Ne povante venki sian scivolemon, malfermis la pordon komunikantan kun granda salono, kaj vidis ĝentilan knabon.

— Kiu vi estas, kaj kion vi faras ĉi tie? — demandis ŝi iom konfuza.

— Mi estas artisto — respondis li — kiu antaŭ longe vendis al mastro de tiu ĉi kastelo, statuon el neĝo. Sciante ke li estas riĉa kaj malavara, kaj troviĝante mi en la mizero, ĉar baldaŭ estis elspezita la mono kiun li donis al mi, mi estis akceptita tie ĉi, kiel servisto; mi vestas min kiel maljunulo, ĉiam kiam li estas min vidonta, ĉar la viro kiu rekomendis min, diris al mi, ke Heriberto ne akceptus min en sia domo, se mi ne estus maljunulo. Jen do responditaj, viaj demandoj. Mi aŭdis vin ludi la harpon, mi rigardadas vin, kaj ŝajnas al mi ke mi trovas en via vizaĝo la trajtojn de mia idealo, de mia statuo. Ĉu eble ĝi estas vi?

— Mi ne scias — ŝi murmuris. Nur mi povas diri al vi ke mi ne havis infanecon, ke mi vekigis al la vivo tia kia mi estas.

— Vi do povas esti mia verko?

— Jes, mi devas esti ĝi.

— Kiel bela vi estas! Kiel mi vin adoras! Kion mi farus por ke vi min amus ankaŭ!

— Kio estas amo?

— Ĝi estas dia fajro, feliĉeco sen limoj, konstanta pasio...

— Mi sentos ĉion tion ĉi.

— Ĉu por mi?

— Por vi.

La skulptisto alproksimiĝis al la knabino, kaj ŝin premis al sia koro.

Ĉe tiu kontakto, Floro el Neĝo klinis la kapon, paliĝis, kaj fine ŝi svenis.

Heriberto eniris en tiu momento en la ĉambron: li prenis la junulinon, kaj ŝin kuŝigis sur kanapon, por ke ŝi rekonsciiĝu. Iom post iom malaperis la trajtoj de la bela virino, kaj ŝia korpo transformiĝis en amaso da neĝo. La radio de la amo, la fajro de la pasio, estis rompinta la sorĉon en kiu ŝi vivis.

La skulptisto foriris malespera, eĉ ne pensante Heriberto lin persekuti: la mastro de l' kastelo frenezigis post nelonge, kaj la gnomo, naiva kaŭzanto de tiom da malbonoj, estis lia heredanto, la posedanto de liaj multaj bienoj, kiujn neniu postulis.

En la laboratorio li kunvenis, dum la nokto, kun siaj kolegoj, sorĉistinoj, fejnoj kaj koboldoj, sed neniu el ili kuraĝis doni vivon al iu alia statuo el neĝo, ĉar ĉiuj konvinkiĝis, ke ekzistas neniu virino kiu restas indiferenta al la ĉarmoj de la amo.

JULIA DE ASENSI

Esperantigis. J. BREMÓN

PENSAĴOJ

Ĉiuj virinoj restas belaj, ĝis kiam ili mem kredas esti tielaj.

La maljunuloj amas doni bonajn konsilojn, ĉar ili ne povas jam doni malbonajn ekzemplojn.

Kiu estus la saĝeca celo? Scii kredi. Kiu estas la deveno el multaj eraroj? Kredi scii.

Profunda penso ĉerpita el albumo de egoisto:
La kato ne nin karesas, ĝi karesas sin per ni.

La amemoj gvidas nin kiel hundo de blindulo, kiu igas al sia mastro halti, antaŭ ĉiuj amasoj da balaaĵoj.

La amo estas kiel la fajro de forno, se vi deziras ke ĝi daŭru, zorgu ne vigligi ĝin tro.

Tradukis, P. AGULÓ.

KANTU, KANTU, KARULINO!

Kantu, kantu, karulino
de la kor';
via kanto de diino
estas flor',
kiu rave nin plenigos
per parfum',
kaj ĝi l'animon dolĉigos
meze lum'.

Vin aŭskultos ni atente
kun ĝojec';
kaj je l' kant' ni ĝuos sente
sub helec'.
Ĝi elfloros tiam fiere;
ĝia son'
nin ĉarmigos ja sincere
per la ton'.

Via buŝo malgrandeta
kaj lipar'
laŭ l' akordo anĝeleta
de l' fear'
movetiĝos kaj ellasos
en l' aer'
tiun kanton kiu pasos
tra la ter'.

Kaj ni restos ravigitaj
de l' kantad',
kaj ni restos ensorĉitaj
de l' aŭdad'l...
Kantu, kantu, karulino,
ravu nin
per via kant' de diino
ĝis la fin'!

JOSEP VENTURA

Terrassa

LA HOMO

Katalune verkita de F. Pujulà Vallés

Estis en libera kampo, dum hela nokto.

Tra mallonga vojo kaj kontraŭa direktado marŝadis du homoj, ĉiu sekvita de hundo. Laŭ la polvo kiu surkovris iliajn vestaĵojn venis de tre malproksime, laŭ la rapida paŝado per kiu iradis, mankis al ili multon por atingi la lokon celatan.

Kiam ili kruciĝis sin faris signalon unu la alian, murmuris kelkajn vortojn kaj daŭrigis sian iradon.

Kioma grandeco kaj kioma malgajeco samtempe!

Kiom granda, estas troviĝi du samformaj materiaĵoj unu fojon, en tiu vivado tiel plena je irantaj estaĵoj! Kiom malgaja tamen! Unu venis de Oriento, de Okcidento la alia, kaj ĉiu sin direktis tien kie la alia revenis. Ju pli ili malproksimiĝos, despli estos plimalproksimiĝintaj la tagon kiam ili estos enŝovigitaj en la tero. Eble ili vidiĝos neniam plu. Eble se ĉiu el ili estus haltiĝinta momenton, vidus ĉe la alia similajn kvalitojn kiuj igus ilin amikoj. Tamen, ili trairis unu apud la alia, nur signante sin reciproke kaj murmurante konsentajn vortojn kiuj estas de ili ne konsentintaj. Estis du similaj estaĵoj kaj eble ili neniam plu troviĝos, eble neniam plu vidiĝos.

Post kelkaj momentoj kiam ili kruciĝis, samtempe ili turniĝis. Ili tion faris ne por rigardadi sin reciproke alfoje; nur tion faris pro la konservada instinkto.

Estis en libera kampo dum bela nokto,
La du homoj samtempe turniĝis kaj kunfajfis.
Ili vokis la hundojn, kiuj ankoraŭ sin flaris unu la alian, meze de la bela vojo.

Tradukis A. B.

TRAMVETURILIRANTE

Peze kvazaŭ perforte, tiun tagon iradis la tramveturilo. Mi ekenuiĝis. Fine ĝin haltigis la konduktoro. Junaj geedzoj kun sia ideto—surbrake portita de dika vartistino—estis en ĝi suprenirantaj. La tramveturilo reprenis sian testudan iradon. Pro manko da loko la vartistino estis devigata disigi de la gesinjoroj, kaj mi aŭdis ŝin malantaŭ mi en la apuda beŝko de la tramveturilo, paroli kun la infano kvazaŭ ĝi povus ŝin kompreni. La etulo saltetis kaj balbutis nekompreneblajn vortojn, kaj mi mortis pro scivolemo vidi la sendube belan buŝeton kiu ilin estis elparolintaj.

Cu la infano divenis mian deziron? Mi ne scias, sed dum mi pensis pri tio, mi sentis ĝian malgrandan manplaton kiu batetis mian ŝultron kaj aŭdis ĝian delikatan voĉon balbutantan «Mam—ma, mam—ma!» t. e. (Panjo, panjo!)

Tiam mi ne povis plu de teni mian deziron vidi la infanajn trajtojn. Rapide mi turnis mian scivoleman rigardon al ĝi kaj restis mirigita pro ĝia beleco. Senkufa kapeto, de kaŝankolora, frizita hararo; malhelaj okuloj, tro grandaj por la eta vizaĝo kaj, mi ne scias ĉu freŝa frago, ĉu ĝia infana buŝo estis la tri belaĵoj kiuj mian atenton altiris. La ĉarmuleto klopodis vidi mian vizaĝon tra la dense vualita ĉapelo kiun mi surportis, kaj ne ĉesis pepadi «Mam—ma, mam—ma!» La vartistino ridetis kaj diris «Tute ne, karulo, la fraŭlino ne estas ja ĉia «mama», jen ŝi estas tie!» kaj ŝi fingromontris la malproksiman tramveturilan benkon sur kiu sidis la junaj geedzoj. Sed la infano, eĉ ne volis rigardi la tiean lokon; ĝi daŭrigis nomante min «mam—ma» kaj karesis per sia delikata maneto mian dekstran vangon al ĝi turnita. La vartistino, la juna patro de la etulo, kelkaj kunvojaĝantoj kaj kompreneble ankaŭ mi, ĉiuj ridis pri la stranga eraro de la naivuleto. Ĉiuj ridis en la tramveturilo—mi diris—sed mi mensogis. Estis iu, en ĝi kiu tute ne ridis. Pri la panjo de la bela infano mi parolas. Silenta kaj serioza ŝi sidis, kun mallevitaj okuloj.

Subite la malgrandulo, spite la baranta vualo de mia ĉapelo, metis sian fingropinteton sur miaj lipoj kaj gaje ridis. Senkonscie mi karesis la fingreton, anstataŭ delikate kiel estis mia deziro, per fortega kiso, en kiu mi sendis al la etulo la simpation kiun per ĝia ensorĉa ridado ĝi vekis en mia animo. Kaŭze de tiu bruega kiso la juna patrino direktis la ĝis nun mallevitan rigardon, rekte al miaj okuloj kaj mi sentis kvazaŭ sago trapikus mian koron, tiel terure ĵaluza estis la rigardo kiun ŝi fiksas sur mi. Feliĉe mi devis malsupreniri de la tramveturilo, kaj ne sentus plu la plumban rigardon de tiu stranga patrino. Mi stariĝis kaj la obstina knabeto ne atentante la korporemon de sia panjo, etendis la belajn braketojn al mi ekkriante: «Nan—ná, nan—ná!» (*)

Rapide mi foriris ĝenata pro la neatendita fino de la tiel belkomencita okazintaĵo; kaj dum la sama vespero mi sonĝis pri komforta ĉambro, en kiu sidis la ĵaluza patrino, viŝante per delikata bonodoranta naztuketo, la belan fingropinton de sia ido, kiun mi tiel ameme kisis!

IU.


(*) Kataluna esprimo per kiu la infanoj volas signifi ke ili deziras foriri, promenadi.



Ŝprucakvejo de la Klostro de la Katedralo

ankaŭ ŝuldas al la nobla sindonemo de liaj heredantoj, la ĵus konstruantan altegan suprofinon, kiu kronos ĝian posthorejon.

(Daŭrigota)




Frontono de la antikva Aŭdienco

LA ANTIKVAJ MONUMENTOJ DE BARCELONO


(Daŭrigo)

Kaj nun ni priskribos la belegan Katedralon, fiereco de la Kristanaro kaj de la lando kiu ĝin starigis; sed tial ke la Katedralo meritas apartan ĉapitron, ni konkretos hodiaŭ, per resuma sciigo.


Ekrekonstruita dum 1298^a, post sep sinsekvaj jarcentoj ĝi ne ankoraŭ estas finita. Dank' al la malavareco de meritinda patricio, Sro. Manuelo Girona, kies cindroj ripozas ĉe la ĥorejo de la templo, oni povis, je la fino de la estinta centjaro, konstrui ĝian facadon, pri kiu ĝis tiam ĝi estis mankohava; oni



Ŝtuparo kaj galerio de la antikva Aŭdienco



Klostro de la Katedralo



Katedralo: Pordo de la Pieco

SUR LA LAGUNO

Ho, nun vespero tia ĉarmega
Kaj la vetero estas belega:
Nun najtingalo rave sonorata
Ĝoje ni naĝu, ĉio favorata.
Ho, kiel bele lumigas luno!
Naĝu gondolo sur la laguno!

Ho, kiel estas Maja aero
Tiel juneca nia espero.
Ho, vi belega, rava knabino
Ekkantu ĝojan kanton senlino
Pri ĝoj' eterna kaj la petolo.
Ho, naĝu, naĝu nia gondolo.

Kaj ni sidigu, koro ĉe koro
Ni nin alpemu, mia adoro,
Kisoj, karesoj kun belulino,
Gajaj kantetoj kaj ĉampanvino.
Ho, amo estu per ni la suno,
Naĝu, gondolo sur la laguno.

Ho, nun vespero tia sonora
Kaj la vetero estas favorata;
Ho, ĉirkaŭprenoj, kisoj sen fino,
Ridoj kaj ŝercoj kun ĉarmulino!
For, for maldolĉoj, teda realo!
Ho, vivu amo kaj idealo!

For songoj, revoj, for superstiĉoj
Nur en gondolo—nia feliĉo.
Ne longe daŭras nia juneco;
Post ĝi nur sekvas dornoj, sklaveco!
Ho vivu Majo, ĉarma printempo
Ho, vivu, vivu juneca tempo.

Ho, ni eltrinku l'amon sen timo
Ĝis fund' de l' koro kaj de l' animo.
Kion alportos al ni la sorto?
Lipojn sur lipojn for respond' vorto.
Ho, mia ĝojo, mia idolo!
Ho, naĝu, naĝu nia gondolo!

ANTONO WIECZORKIEWICZ

HUMORAĴO

Sinjoro eniris en razejon el urbeto por sin razigi. La razisto surmetis al li viŝtukon, kiu almenaŭ jam de dek monatoj ne estis vidinta la lesivon kaj tuj eksapumis lin per senhara penikego kiu nur enhavis iujn harojn.

La sinjoro jam tute malkonfida sin alarmis vidante la raziston aplikanta sur sia vango, razilegon difektitan.

— Almenaŭ — diris la sinjoro al la razisto subtenante lian brakon, ĉu vi scias bone razi?

— Ho! tion mi kredas—respondis la razisto.

— Kie vi pasigis vian lernadon?

— Ĉe mia patro.

— Ĉu li ankaŭ posedis razejon?

— Ne sinjoro. Li estis viandvendisto.

Aŭdinte tion la sinjoro tuj sin levis forkurante kun la viŝtuko surmetita

J. BUYÉ
Ano de Ĉ. A.

DIVERSAJ SCIIGOJ

Mahona Grupo Esperantista. — En sia ĝenerala kunsido solenigita la 22^{an} de Januaro 1911, elektis la jenan Direktan Komitaton:

Honoraj Prezidantoj: S-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof; S-ro Jozefo Juaneda, Pastro; la Prezidanto de «Sciencma Mahona Ateneo»; la Prezidanto de H. S. p. p. Esperanto; Aktiva Prezidanto, S-ro Jozefo M.^a Doménech Puigjaner; Voĉdonantoj, S-ro Antono Tuduri Punseti, Jakobo Sala Gomila, Antono Fradera, Carreté, Emmanuelo Sintés Rotger, Bartolomeo Pons Aragones, Petro Ripoll. Adreso: Grupo Esperantista.—Ateneo.—Mahón (Balears).

Sub la nomo «Komerco-Industri-Esperantista Oficistaro», la grava Societo «Centre de Dependents del Comers y de la Industria de Sabadell», je la lasta Decembro fondis Esperantistan Sekcion kies celo estas faciligi al siaj anoj pligrandigadon de ilia kono pri Komerco kaj Industrio, uzante por tio Esperanton kiun samtempe propagandos penante, laŭ tuta sia povo por ke ĝia uzo, kiel eble plej baldaŭ, iĝu ordinara en internacia komercaj kaj industriaj aferoj.

La elektita Estraro estas: Prezidanto, R. Graupera; J. Bernaldo, Vicprezidanto; R. Bassols, Kasisto; J. Arús, Bibliotek-arhivisto; kaj P. Oriachs Solé, Sekretario.

Internacia Studenta Esperantista Frateco. — Ĝia celo estas: I. Krei fratajn rilatojn inter la tutmondaj geestudentoj. II Interligi ĉiulandajn geestudentojn en propaganda unuigo. III. Disvastigi la Esperantan lingvon tra la tuta mondo. Jara kotizaĵo 0'50 Sm. La Sekretario: *Arnold Ll. B. 24 Str. Marks Place, Nov-Jorko, U. S. A.*

Groupe Esperantiste du Bon Marché. — Kurso klarigita de Sinjoro Warnier, al kiu ĉeestas pli ol 40 ĝelernantoj, okazas, ĉiu ĵaŭdo vespere, en la Salono de legado de la famaj magazenoj el Parizo tiel konataj, kies nomon prenis tiu grupo. Ĝia Vicprezidantino estas F-ino Perrot; la Kasisto S-ro Dreu; la Sekretario nia amiko kaj kunlaboranto S-ro Larousse kaj la Arhivisto S-ro Trestard.

«La Esperantisto». — Nia malnova germana kunbatalanto, ĵus komencis la trian jaron de sia apero kaj la numero de Januaro, kiun ni ĵus ricevis, pruvis la grandan simpatian, kiun ni ĉiam havis por ĝi. Sur 16 bele ilustritajn paĝojn po numero ĝi enhavas tre interesajn artikolojn en bonstila Esperanto kaj la bela kovrilo montras al ni, ke «La Esperantisto» aperas ĉiumonate jam en 5500 ekzempleroj, certe la plej bona pruvo por la aplaŭdo, kiun ĝi ĉie trovis kaj prave meritas.

Al definitiva venko. — La 22^{an} de la estinta Februaro S-ro Tristan Bernard, en la Teatro Femina, el Parizo, proklamis la rezultaton de la lingvistika konkurso, malmefermita de la fama ĵurnalo Excelsior.

Laŭ franca teksto de M. Abel Hermant, ses tradukistoj faris tradukon italan, hispanan, rusan, anglan, germanan, kaj esperantan. Oni mendis poste al aliaj ses malsamaj personoj, retraduki la tekston al franca lingvo kaj tiujn ses francajn tradukaĵojn oni komparis kun la originala teksto.

La ĵugantaro, kumetita de la nomitaj S-roj Bernard kaj Hermant, krom S-ro Alexandre Kepp, restis mirigita rimarkante ke la tekstoj itala kaj es-

peranta reproduktis preskaŭ idente la unuan francan tekston. Cetere la duobla germana traduko ne multe sukcesis; ĉiomi pli bona estis la angla, kaj la hispana nur montris 2 aŭ 3 sufiĉe gravajn erarojn. La plej mirinda estis la itala; sed nia kara Esperanto, laŭ konfeso de la juĝantaro, atingis rezultaton tiel kontentigu almenaŭ, kiel tiu de la itala lingvo. Ni ĝoju!

Diversaj frazoj ĉerpitaj el kelkaj skribaĵoj pri la komedieto «Mistera Krimo».

Vian verkon «Mistera Krimo», mi ricevis kun plezuro kaj danko. — *L. Zamenhof.*

«Laboro Esperanta» respondas al via ĝentileco per la esprimo de sia danko tre sincera kaj admirplena, gratulante vin kore pro via laboro intertempe atendas novajn sukcesojn por vin gratuli...

— *Por la grupo, La Sekretariino. Terezino Rosell. Vilanova i Geltrú.*

Mi dankegas vin pro la sendo de «Mistera Krimo», kiun vi aranĝis tre bone al Esperanto kaj kiu signas vian bonan progresadon en nia kara lingvo. — *Román Ayza. Madrido.*

Mi legis la spritan verkon per kies donaco vi honoris min. Plaĉis al mi tre multe «Mistera Krimo» kaj pro ĝi mi vin tutkore dankas... — *Josep Anglada. Barcelono.*

Tre danke mi ricevis la komedion «Mistera Krimo» kiun vi afable sendis al mi. Mi kore dankas pro via tre valora donaco. Kun plezuro mi legis vian verkon... — *H. Hankel. Dresdeno.*

Robert Larousse gratulas sincere S-ro Cases kaj lin tre kore dankas pro lia afabla donaco. *Paris.*

... Mi legis malrapide kaj atente vian «Mistera Krimo» kaj mi ree konvinkigis ke vi havas enviindan lertecon por uzi nian internacian lingvon, kaj ke vi posedas spritecon kaj guston por la malfacila humorgajiga literaturo. — *Gustau Galcerán. Vilanova i Geltrú.*

... Ricevinte vian verkon «Mistera Krimo», mi vin korege dankas pro tiu ĉarma teatraĵo, kiun mi grandplezure legis. Mi kredas, ke estas tre efika ludo por esperantaj festoj. — *D-ro H. Arnhold. Dresdeno.*

... Mi varme dankas kaj gratulas pro via sprita «Mistera Krimo», kiu nedireble amuzis min. — *Roksano. Beziers.*

... Vika Esperantistaro ricevis vian verkon «Mistera Krimo», certe tre bone aranĝita. Dum ĝia legado la Vikanaj esperantistoj amuzigis kaj ĉiuj aplaudis vian komedion. — *Por Vika Esperantistaro, La Prezidanto Jozefo Palmarola.*

Mi ricevis vian laŭdindan verkon... — *K. Saltiveri. Barcelono.*

Mi ricevis vian belan komedieton kaj gratulas vin pro via nova verko, rimarkinda kiel ĉiuj viaj... — *Jozefo Puiggali. Barcelono.*

... miaj plej bonaj dankoj pro la afabla sendo de via amuza komedieto. — *J. René Benoit. Sévres (S. et O.).*

Dankon pro via «Mistera Krimo», kiu multe ridigis min. — *Fred. Pujolá. Barcelono.*

Kun granda ĝojo mi legis vian komedion «Mistera Krimo» kaj tutkore mi gratulas vin pro ĝi. — *D-ro W. Van Der Biest. Antwerpeno.*

Plezure ni ricevis vian estimindan verkaĵon «Mistera Krimo»... Ni varme vin gratulas pro via novaperinta verko, kiun tre taŭga por ludado, ni pensas prezenti kelkfoje ĉi tie. — *Por «Lumon» (esperantista grupo el Terrassa), La Sekretario. Josep Ventura.*

Mi estas ricevinta vian sendaĵon... mi ĝin tralegis, trovinte ke ĝi estas vere amuzaĵo, kiel vi ĝin kvalifikas. — *Klaŭdjo Planell, Pbro. Barcelono.*

Havinte la honoron kaj ĝojon ricevi de vi la amuzan teatraĵon «Mistera Krimo», kiun mi tuj tralegis, mi nun petas vin akcepti mian sinceran dankon kaj restas kun samideana saluto kaj gratulo. — *Werner Anttila. Helsingfors (Finlando).*

Mi kore dankas vin pro la ĝentila sendo de via bela kaj spritplena «Mistera Krimo». Al vi ŝuldas la esperantistaro novan juvelon. — *R. Codorniu. Murcia.*

BIBLIOGRAFIO

KAATJE, kvarakta teatraĵo de Paul Spaak, ludota dum la 7^a Kongreso de Esperanto kaj esperantigita de D-ro W. Van Der Biest. Mendeblo de la tradukinto: 76, Minderdroedersru, Anvers. Prezo: Fr. 2'50.

Jen io el kion diris pri tiu verko S-ro F. de Ménéil:

«Unu el la profitoj, mi povas eĉ diri el la plej interesaj, kiun ni ricevas de niaj universalaj kongresoj, dank' al nia lingvo Esperanto, estas pli profunda kono pri la intima sento de la lando, en kiu la kongreso okazas. Ĉiu bone scias, ke tiu intima sento elmontriĝas per la literaturo precipe, ĉar la literaturo estas la plej pura esprimo de la rasa animo, kiu havas siajn proprajn vortojn kaj frazmanierojn por esprimi siajn proprajn pensojn. La sperto venke montris, kiamaniere Esperanto, pli multe ol iu nacia lingvo, alproksimiĝas al alia nacia lingvo, kondiĉe ke la traduko estu verkita de samnacia esperantisto, kiu pli bone transdonas la intimecon de sia nacieco. Niaj unuaj kongresoj montris la vojon. La belega ekzemplo donita de Emmanuel kaj Hedwig Reicher trovis poste imitantojn. *Mistero de Doloro* de la potenca dramisto A. Gual instruis nin pri la Kataluna sento. La venonta kongreso promesas al ni similan ĝuon: Kaatje, la profunde emociplena dramo de Paul Spaak, belga aŭtoro, ŝajnas tute difinita por konigi al ni «la psikologion, la animon, la vivon» de la flandra-nederlanda raso.

Mi ĵus legis la belan verkon de Paul Spaak en la franca teksto kaj en la tre lerta esperanta traduko verse verkita de D-ro Van Der Biest, kaj mi tut-

kore dankas al niaj belgaj amikoj, organizantoj de la Sepa kongreso, ke ili elektis tiun verkon, prezentotan de profesiaj geaktoroj, kiuj de nun jam lernas Esperanton, por ke ili pli ĝuste interpretu sian rolon. Tiu arta konscio meritas laŭdojn; antaŭajn ekzemplojn ni trovis en Dresdono kaj Barcelono, kaj tio certigas al ni la estontan sukceson de la prezentado.

Tute simpla estas la temo, sed per kia profunda sento, per kia nediskutebla vero, per kiu sincera amo al la naskiĝa lando, la aŭtoro desegnis la karakterojn de siaj geherooj! Nur la legado de la teksto naskas intiman emocion tute korpemantan, kvankam la verko estas nederlanda, ĉar antaŭ ĉio ĝi estas vere homa.

Kaatje, kvankam en Flandra kostumo, estante la esprimo de universala sento, okupos tre prave sian lokon, en universala kongreso de Esperanto, en Belgujo.»

**

Nun lasu ni paroli la tradukinto D-ro W. Van Der Biest:

«PAUL SPAAK naskiĝis la 5^{an} de Julio de 1871 en Bruselo, kie li nun ankoraŭ loĝas kaj praktikas, kiel advokato.

Liaj ĝis nun publikigitaj verkoj estas:

Voyages vers mon pays. (Vojaĝoj al mia lando), aro da versoj; *Kaatje; La Madone.* (La Sankta Virgulino), duakta teatraĵo en versoj; *La dixième journée.* (La deka tago), unuakta teatraĵo en versoj.

La plej grandan, plenrajtan sukceson akiris *Kaatje*. Ĝi estis prezentata proksimume centfoje, en dekduo da urboj en Belgujo kaj Holando, en Parizo (*Théâtre des Arts*), kaj en Buenos Ayres.

S-RO WILLEM KLOOS kaj S-RO ANTOON MOORTGAT ĝin tradukis en nederlandajn versojn, kaj jen ĝi estas nun esperantigita.

Ĉe la kvindeka prezentado de *Kaatje* en la Brusela *Théâtre du Farc*, la fama poeto EMILE VERHAEREN faris rimarkindan paroladon pri tiu teatraĵo kaj la unua stato de la franclingva belga sceneja literaturo.

Kaatje estos prezentata dum la Sepa Universala Kongreso de Esperanto (Aŭgusto 1911) en la Reĝa Nederlanda Teatro de Antverpeno.

La direktoroj de tiu teatro, S-ROJ GUSTAAF DE LATTIN kaj FRANS VAN LAER, konfidis la prezentadon de la esperantigita *Kaatje* al la sama ĉefreĝisoro (S-ro Arië Van den Heuvel) kaj la samaj geaktoroj, kiuj havas en sia repertuaro la ofte ludatan nederlandan tradukon, verkitan de SINJORO MOORTGAT kaj kies nomoj estas: S-INOJ: MARIE VERSTRAETE (La Patrino), HÉLENE BERTRIJN (Kaatje), MAGDA JANSSENS (Pomona); S-OJ: LOUIS BERTRIJN (Jan), kaj KAREL VAN RIJN (La Patro).

**

DICTIONNAIRE USUEL ESPERANTO - FRANÇAIS, de Grosjean - Maupin, ekslernanto de la Supera Normala Lernejo de Paris, agregaciulo de la Pariza Universitato. — Unu bela tre legebla kompostita 144-paĝa volumo bindita. Librejo Hachette kaj K^o, 79, boul. Saint-Germain, Paris; Prezo: Fr. 1.

Tiu *Dictionnaire Usuel*, celas la komencantojn kaj tiujn, kiuj lernas la lingvon. Krom tre malmultaj radikoj zorge signitaj per steleto kaj preskaŭ ekskluzive prunteprenitaj el la verkoj de S-oj Kabe kaj Verax, ĝi enhavas nur radikojn akceptitajn de Zamenhof. Ĝia ĉefa merito kuŝas precipe, unuflanke, en la abunda kolekto da derivaĵoj, kunmetitaj vortoj kaj utilaj esprimoj, kiuj estas preskaŭ ĉiuj ĉerpitaj el la Zamenhofaj verkoj, aliflanke, en la diligenteco kun kiu la aŭtoro indikis kaj klarigis, ofte per ekzemploj, ĉu la malsamajn signifojn, ĉu la propran kaj precizan sencon de ĉiu vorto.

Eĉ se oni nur folias tiun libron, oni rapide rimarkos ĝiajn multvalorajn meritojn kaj utilojn kaj la nediskuteblajn progresojn, kiujn ĝi realigas, malgraŭ la malgranda oportuna formato kaj la malkarega prezo.

**

Teoria Ekzameno de la lingvo Esperanto kun fonetika internacia alfabeto sistemo ANTIDO N.º 2. — Gramatiko, Ekzercaro, Krestomatio. Prezo: Sm. 1'00 Genève. Librejo Kündig, Corraeterie, II.

**

UTILECO DE ESPERANTO por la blinduloj. Prezenti Levy kaj aliaj. Prezo: 0'25 (0.10 Sm.).

ESPERANTO KAJ LA BLINDULOJ. — Jarlibro por 1910. Prezo: 0'25 (0.10 Sm.). Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ATENTU

Ni donacos la tutan kolekton de la ĝis nun aperintaj numeroj de TUTMONDA ESPERO al tiu, kiu unue sendos al ni la klarigan-solvon de la jena

PROBLEMO

Trovi la kvocienton kaj la restaĵon de iu ajn nombro dividita per alia kumetita de ciferoj 9, uzante nur la adicilon.

EKZEMPLO

7684583461999

En la venonta numero ni publikigos la nomon de la aŭtoro de la problemo kune kun ĝia solvo kaj la rezultato de tiu ĉi konkurseto.

GAZETARO ESPERANTISTA

De «*Germana Esperantisto*». — Esperanto Verlag Möller & Borell. — Berlin S. W. — 68, Lindestr. 18/19.

KIU TROVAS, TIU TENAS. — Promenante en publika parko, knabo trovis arĝentan sespencon, kaj lia ĝojo altiris la atenton de bubo, kiu demandis al li, kion li trovis.

— Sespencon, diris la feliĉa trovinto. — Tiu estas la mia, diris la bubo, — mi ĵus ĝin perdis.

— La via ne havas traborintan truon tra ĝi, respondis la knabo.

— Jes, ĝi havas, bruvoĉe diris la bubo.

— Nu, do, — dolĉe respondis la knabo, — tiu ĉi ne havas tion. Bonan matenon.

ROBERTO SUTCLIFF

ĈU ESPERANTO JAM DONAS PRAKTIKAN PROFITON? — Oni ofte aŭdis diri, que Esperanto liveras ĝis nun nur idean utilon, nenian praktikan.

Pri mia unujara vojaĝo al Sudameriko, el kie mi ĵus revenis, mi povas rakonti la kontraŭon.

Apenaŭ lerninte Esperanton, mi jam estis alparolata du fojojn en orienta Prusujo de fremduloj, kiuj vidis mian verdan stelon.

Poste mi estis en Parizo. Sur la Eiffel-turo estis poŝtkartvendejo. Kiam la vendisto ekvidis la signon, li tuj interrompis sian francan parolon kaj daŭrigis la proponojn esperante. Kompreneble mi tiam aĉetis.

Dum la sama vespero mi manĝis en hotelo. Sinjorino, kiu preteriris mian tablon, demandis min france, ĉu mi parolas esperante. Kompreneble

mi respondis esperante. Post kvin minutoj mi jam estis prezentita al ŝia edzo, altestiminda sinjoro, kaj ni tri sidis kune, ne atentante la tempon, ĝis malfrua nokto. Estis feliĉaj horoj.

Sed la plej grandan utilon per Esperanto mi havis dum mia longa estado en Ĉilujo. Tuj mi havis konatojn, amikojn, kiuj vere bonvolis al mi, kiuj interesis kaj zorgis pri mi. Dum aliaj junuloj, kiuj jam longe antaŭ ol mi alvenis Valparaison, devis mortigi sian tempon per trinkeja sidado — nur pro manko de alia okupado — mi havis belegajn, interesajn kaj utilajn horojn.

Kiam mi volis viziti la najbaran urbon Santiago, mi nur skribis al la tiea grupo, kiu tiam sendis stelportantan delegiton al la stacidomo, kiu kondukis min tra ĉiuj eblaj vidindaĵoj de la interesa urbo. La agema grupo invitis min de unu al ĉiuj ĝiaj grandaj festoj, mi vere amikiĝis kun kelkaj kaj varme konatiĝis kun multaj membroj, kaj mi povas sincere diri, ke miaj plej agrablaj tagoj en Ĉilujo estas travivitaj per Esperanto.

Ne alie estis poste. En Rio de Janeiro mi volis aĉeti libron. La vendisto portis stelon, mi do ne bezonis montri mian nekonojn de la portugala lingvo. Li tuj kondukis min al la konsulo de U. E. A., kiu veturis kun mi tra la belega urbo kaj montris al mi vidindaĵojn, kiujn mi sen lia helpo neniel estus trovinta. Ŝarĝite je Esperantaĵoj kaj belaj memoraĵoj pri Ameriko mi dankplene al Esperanto forveturis Europon.

En Liverpool mi trovis tiel same koran akcepton, kaj nun mi havas la ĝojon, ĝui ĝin en Londono. Dankante tree al la du anglaj samideanoj, mi direktiĝas al mia proksima celo — Belgujo — certe sciante, ke ankaŭ tie mi havos hejmon en Esperantujo.

Eĉ se mi havus nenian idealan intereson pri Esperanto, mi tamen restus Esperantisto por la jam nun efektivegeblaj praktikaj utiloj.

HENRY MEYER

AVIZO.—Al S-roj Abonantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la jaran abonpagon, ni petas ĝin sendi kiel eble plej baldaŭ.

REDAKCIA KORESPONDADO.—S-ro J. A. Ll.—La afero estas tro konata. Ni bedaŭras ne povi komplezi Vin. Tamen ni dankas.—S-ro P. A.—Viaj humoraĵoj taŭgas. Ili aperos. Dankon.

ESPERO KATALUNA

TALLERS, 81, ĈEFA ETAĜO
BARCELONO

La plej malnova Esperantista Societo el Katalunlando

Biblioteko kun pli ol 300 volumoj.

Ankaŭ pli ol 70 nunaj kaj diversaj gazetoj kaj revuoj Esperantistaj ĉiam legeblaj.

Senpagaj kursoj de Esperanto, klarigitaj de lertaj geesperantistoj.

Amuzaj "Verdaj Vendredoj" por praktiki Esperanton.

Teatraj prezentadoj, ekskursoj, festenoj, k. c.

MONATA KOTIZAĴO 1 Peseto

SOLVO de la DUOBLA INTERMETO HIEROGLIFA

AR-TO

AR-BUS-TO

AR-GEN-TO



HIEROGLIFO

OL A

NOVEJARQUE (A)

ESPERANTISTA POSKALENDARO por la Jaro 1911

Redaktoro: Prof. Dro Siegr. Lederer, Prago.

Gia enhavo, eĉ pli riĉa ol tiu de la antaŭaj eldonoj, konsistas el ambaŭstila kalendaro, interesaj artikoloj, praktikaj tabeloj kaj kompleta listo de ĉiuj grupoj esperantistaj. Speciale ni atentigas pri nia enigma konkurso, 100 M. da monpremioj


Prezo: 1 M. (0,500 Sm); aŭfrankite ĉien 1,20 M. (0,600 Sm).

Per mendantoj ĝis la 15^a de Novembro: 0,80 M. (0,400 Sm), aŭfrankite ĉien 1,-- M. (0,500 Sm).

Oni postulu specialan prospekton de Esperanto Verlag Möller & Borel
Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19
kaj korespondantoj.

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI

ONI VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Ballespi

Strato Ample, 43-BARCELONA